

Numero: 270.  
Novembro: 2014.

22-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# NEBULO

## La plej bona fremda lingvo

Estis du homoj. Viro kaj virino. Ili vivis en diversaj kvartaloj de la urbo. Ili ambaŭ vekigis fruamete kaj post la abunda matenmanĝo ili ekiris al la urbocentro.

En tiu mateno estis grandega nebulo kaj ĝi envolvis la tutan urbon. Kiel giganta kovrilo kuŝiĝis sur la tegmentojn de la domoj. Oni ne povis vidi trans la strato. Kvazaŭ griza vualo fermus la rigardon de la okuloj.

Ili iris monotone. Ja, ĉiutage ili laŭiris la vojon kaj ili rimarkis nenian nekutiman. Nur tio estis stranga, ke nun ili vidis nenion. Alifoje ofte ili ekstaris antaŭ montrofenestro rigardante la vestojn kaj ŝuojn.

Pro la densa nebulo ili ne havis emon por rigardaĉi sur la strato.

Ili iris kaj iradis. Ili sciis nenion unu pri la alia. Neniam ili renkontiĝis kaj ne vidis unu la alian. Eble ĉiutage ili estis en la sama strato.

Ĉi matene io okazis. Ili rapidege paŝadis kaj deziris atingi baldaŭ la oficejon kaj forgesiĝi pri la sufoka nebulo. Neniu ŝatas promenadi en tia veteraĉo. La homoj kuras serĉi tegmenton super la kapon. La varmo en tia vetero estas agrabla. La viro ravadis sidadi en la varma ĉambro kaj legadi aŭ trankvile labori.

Ankaŭ la virino plirapidigis siajn paŝojn, kaj eble ŝi revadis pri sennebula, animagorda ejo.

Ili ambaŭ rapidis kaj ĝis nun ĉiam senprobleme preteriris unu apud alia. Pro la nebulo ili estis blindaj kaj neatendite okazis la fatala karambolo.

-Pardonon! – diris la viro.

-Bovo, kial vi ne rigardas? – ekkriis la virino kaj ŝi komencis kolektadi la terenfalantajn paperojn el siaj manoj.

-Ne koleru! – siblis la viro kaj li helpis al ŝi.

-Ne gravas – mildiĝis fine la virino.

Kiam ĉiu papero estis en la mano de la virino, ili ankoraŭfoje ĵetis mallongan rigardon unu al la alia kaj ili ekiris al la varma, komforta oficejo, kie ili baldaŭe tute forgesiĝis pri la densa nebulo.

-Redaktanto-



Sur la strato du homoj babiladis. Ili estis mezaĝaj kaj la vivo instruis ilin pri la vivo. Ili jam ne estis infanoj, kiujn ankoraŭ oni povas trompi.

-Ĉu vi rememoras, en la lernejo ni lernis la rusan lingvon kaj tiam oni diradis al ni, ke post kelkej jardekoj la lingvo de Puŝkino estos la unusola komunikilo kaj ĉiu lernos kaj parolas ruse. Kio belega ideo ĝi estis. Mi kredis tion. Ŝajne oni pravis. Ĉu ne? Ankaŭ vi lernis la rusan lingvon. Ne diru, ke ne!

-Aŭskultu min! Verdire mi lernis ĝin. Ĝi estis devigita lernobjekto. Tiam ĉiuj gelernantoj devis lerni tiun ĉi lingvon. Sed sciu, jam tiam mi lernis ankaŭ germane. Miaj gepatroj ebligis al mi viziti privatan lingvoinstruiston. Ĉiusemajne dufoje mi iris al lingvokurso kaj mi lernis la germanan lingvon. Certe vi scias, tiutempe multaj germanaj turistoj vizitis Hungarion. En la balatonbordaj urboj kaj vilaĝoj ĉie oni aŭdis germanan parolon. La kelneroj, butikistoj kaj ĉiu amase lernis germane. Laŭ mi ankaŭ vi rememoras pri tiuj jaroj, jardekoj, ĉu ne?

-Tamen mi diras al vi, oni ĉiu devus lerni la anglan lingvon. Ĝi estas la unusola mondlingvo. Vidu la duono de la homaro parolas kaj komprenas ĝin. Laŭ mi granda problemo, ke sur terglobo ne ekzistas komuna helplingvo per kio oni povus komprenigi sin ĉie.

-Ĉu la angla? Laŭ mi ĝin la francoj, eĉ hispanoj, portugaloj neniam akceptos. Ili estos kontraŭ la angla lingvo. Ni bezonus ian, sendependan, neŭtralan, facile ellerneblan helplingvon. La naciaj neniam povos solvi tiun ĉi lingvan haoson, kiu regas sur la terglobo. Kiu scias la solvon? Estus bone eltrovi tiun lingvon, kiu povos fariĝi komunikada pontolingvo de la homaro. Kiel vi opinias pri tio?

-Vi pravas, tiu ĉi afero estas tre malfacila. Mi estus papo, se mi sciis pri ĝi la respondon. Amiko, ne mia tasko solvi tion ĉi. Tial estas lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj. Dume ni lernas kaj lernadas diversajn fremdajn lingvojn, kiel ĝis nun.

La alia viro konsentis kaj li proponis al sia kunulo iri en drinkejon por trinki kruĉon da biero.

Ŝaŝa



## Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
V-a

La onklino silentis ĝis hejmo. Johano ne komprenis, kio okazis. Kvazaŭ ŝi estintus kolerema. Alifoje ŝi ĉiam ŝercadis, babilis, eĉ unu sekundon ŝi ne silentis.

Ĉu li faris malbonon? Ĉu li insultis la maljunulinon? Kion li faris pro kio ŝi insultigis?

Tio ĉi tre ĝenis Johanon, sed li timis demandi la kialon.

Apenaŭ li alvenis Lunon kaj jam erupciis inter ili nekomprenebla miskompreno. Eble lia onklino ion ne komprenas, aŭ ŝi scias ion, kion li ne?

Kial estis malbone, ke ankoraŭ vojaĝante tien ĉi li ekkonis belan junulinon kaj ili denove renkontiĝas. Ja, li estas juna viro kaj bezonas la socion de la alia sekso. Ĉu lia onklino estus ĵaluza pro tio?



Johano komprenis nenion. Apenaŭ li atendis la hejmenigon. Espereble tiam li ekscion ion pri la rapida humoroŝanĝo de la onklino Izabela.

-Kio okazis kara onklino mia? Vi ŝajnas tro trista kaj zorgoplena.

Unue la maljunulino ne respondis. Por ke ŝi evitu la ĝenan babiladon ŝi komencis ordigadi la objektojn en la vitroŝranko.

Johano devis ripeti la demandon:

-Kio okazis kara onklino mia? Ĉu vi koleras kontraŭ mi?

Izabela lasis la ordigadon kaj laŭte ŝi eksuspiris. Ŝi turnis sin al Johano kaj fikse ŝi rigardis en liajn okulojn.

-Johaĉjo, mi timas vin.

-Ĉu vi timas min? Kial? Kio okazis? Mi komprenas nenion. Kara onklino mia, bonvolu klarigi tion al mi, ke mi vidu klare, kio okazis?

-Nu, aŭskultu min, Johaĉjo! Vojaĝante al ni en la kosmoŝipo vi ekkonis ĉarmulinon...

-Ĉu jam ankaŭ tio ĉi estas problemo tie ĉi sur Luno? Ĉe ni sur la terglobo tio estas natura afero – li interrompis la parolon de la maljunulino.

-Lasu min paroli. Mi petegas – diris Izabela. – Ĉu vi pensas, ke tiu ĉi renkontiĝo estis hazarde?

-Kial ne? Ja, ankaŭ ŝi estis nur simpla pasaĝero, kiel mi.

-Mi devas ridegaĉi – faris grimacon la onklino kaj ŝi iris pli proksimen al Johano. - Ĉu ne strange, ke vi revidis fraŭlinon Elizabeton en la parko?

-Por mi tio ne estas stranga. Ankaŭ sur Tero okazas simila randevuo. Mi diras al vi sincere, Elinjo ege plaĉas al mi.

-De tio mi timas – serioziĝis ŝi kaj sidiĝis sur la kanapon. Ŝi montris, ke ankaŭ Johano sidiĝu apud ŝin.



Ankaŭ li sidiĝis kaj la onklino Izabela ĉirkaŭbrakumis la ŝultron de sia nevo.

-Aŭskultu min kara Johano! Tiu virino estas ĉarlatana kaj se vi ne estos singardema, tiam baldaŭe vi trovos vin en timiga krimbando. Mi petas vin, evitu ŝin! Kompreneble vi jam ne estas eta infano kaj vi mem devos decidi. Mi bonege konas ŝin. La fraŭlino Elinjo ekcelis vin kaj ŝi deziras misuzi vin. Espereble akceptos la konsilojn de via maljuna onklino.

Johanon skuus, kion diris al li la onklino. Li ne sciis, kion respondi.

Unue li pensis, ke tio ĉi estas nur malbona ŝerco kaj la maljuna virino baldaŭe ekridos kaj denove ĉio estos en ordo, kiel antaŭe.

Ili longe silentis. Ili nur mute sidis unu apud la alia. La muroj de la loĝejo travidebliĝis kaj antaŭ ili estis la tuta stela firmamento. Sur Luno ĉiu domo estis tia. Sed de ekstero la domanoj kaj la objektoj ne estis videblaj.

Tiel oni sentis, ke oni ŝvebas en la kosmo. Tio ĉi estis eksterordinara travivaĵo.

Post longa silento la onklino Izabela ekstaris kaj ŝi diris bonintence:

-Nevo mia, Joĉjo, mi petas, estu singardema! Tiu knabino estas danĝera.

( daŭrigota )



## Poezio

Estas agrable legi poemojn ankaŭ en nia kureganta mondo. La legado trankviligas la homan animon kaj flugigas nin al nekonataj terenoj. La poezio donas al ni eksterordinaran senton, kiu varmigas nian koron.

Do, ne hontu legi poemojn! Ne pasu tago sen la legado de almenaŭ unu poemo!

Ankaŭ en Esperantujo estas famaj kaj talentaj poetoj. Meritas ankaŭ ilin legi.

-AKB-

### Kial tiuj etaj damoj...? de Raymond SCHWARTZ

aperis en *Nica Literatura Revuo*, 3/5, p. 164

La dameto, kiu floras nokte sur kafejteraso,  
kun ridet' sur ondaj lipoj, kun kavet' en vangograso,  
kies kruroj elokvente mokas konvenciajn jupojn,  
ankaŭ tiu eta damo havas niajn priokupojn.

Ankaŭ ŝi ne fuĝi povas el ŝablonoj de l' serio,  
ankaŭ ŝi neniam ĉerpis oron el la loterio,  
kaj post tago tag' alias kun la samaj garnituroj:  
Kapdolor', flikota ŝtrumpo, rost' aŭ frosto kaj...  
fakturoj!

Pro filet', sub fremda zorgo, ne fermiĝis la cikatro,  
tiom pli, ke ŝi neniam aŭdis ion de la patro!  
Kaj la karaj koleginoj, pli ruztrompaj ol serpentoj --  
por nenion diri, krome, pri postuloj de l' klientoj...

La dametoj, kiuj floras nokte sur kafejterasoj,  
saĝe maskas ted-obsedon de l' intimaj embarasoj.  
Kial tiuj etaj damoj estus ne, por ni, ekzemplo,  
eĉ se ni la vivkonceptojn kultas en alia templo?



### ONI MALFERMAS LA BUTIKON de Raymond SCHWARTZ



Ho sankta Muz', mistermaskita io,  
Legendfigur' por pia fantazio,  
Ne kredas mi, ke ie vi ekzistas,  
Sed al la tent' mi tamen ne rezistas  
Alvoki vin laŭ famaj pramodeloj. —  
Kun aŭreol' de mistifik-mistiko  
Alflugu do, estrino de l' pedeloj,  
Por levi nun kurtenon de l' Butiko!  
"Hi hi! Ha ha! — Vi tro facile mokas,  
Sed vane min oni neniam vokas.  
Mi venis, jen! — ho ne por vin inspiri,  
Mallonge nur al vi mi volas diri,  
Ke via rim-malkara *poezio*  
Ne estas art' kreita dum ekstazo,  
Ĉar via task' konsistis nur el tio:  
Kolekti la ... sterkpomojn de Pegazo!  
Kaj — inter ni — ĉu iam simpla floro  
Aŭ birdokant' vin tuŝis en la koro?  
La noktospir' sub la ĉielkupolo  
Ne ĉarmas vin; — vin logas nur petolo,  
Banala ŝerc' kaj dubesana sprito.  
Kaj tion ĉi ... indulgas la kritiko!  
Disiĝu ni kaj restu, laŭ merito,  
Mi sur Parnas', vi ... en spicistbutiko!"  
Severa Muz', — vi ŝutis malavare  
Benvortojn sur hometon; kiu ŝpare  
Misuzis vin ĝis nun sub sia plumo,  
(Estonte li vin lasos en mallumo.)  
Sed tamen mi kun tre respektaj sentoj  
Koncedas, ke ... ekzistas kaŭz' por miri,  
Kaj por edif' de miaj geklientoj  
Necesis tion diri.





# Por infanoj

La fabeloj de Aisopos  
(Grekaj fabeloj)

## La aglo kaj la vulpo



La aglo kaj la vulpo decidis fariĝi amikoj kaj en la estonto ili loĝi unu al la alia proksime. Ili tiel pensis, se ili estos najbaroj, tiam ankaŭ ilia amikeco estos forta. La aglo faris neston sur la supron de alta arbo kaj tie ĝi kovadis siajn idojn. La vulpo faris loĝlokon por si kaj siaj etuloj malsupre en densa arbusto. En iu tago la vulpo iris por ĉasadi. La aglo flugis al la vulpidoj, ĉar ĝi ne havis manĝaĵon. Ĝi kaptis la vulpetojn kaj ĝi kun aglidoj manĝis ilin. Alveninte la vulpo vidis kio okazis. Ĝi tre malgajiĝis pro la morto de siaj idoj. Sed ĝi sciis, kiel surtera besto ne povas venĝi la aglon. Ĝi ne povas peli la birdon. Tial ĝi rezignis – nur tio ĉi restis por la malfortuloj kaj senhelpuloj – kaj ĝi malbenis sian malamikon. Sed baldaŭe aglo devis sperti la suferon pro la malhonorigado de la amikeco. Okazis, ke sur la kampo oni ofertis kapron. Ĝi fulmrapide flugegis sur la altaron. De tie ĝi forrabis ankoraŭ fajran internaĵon de la besto. Kun ĝi la aglo flugis en la neston. Subite ekventis kaj la sekaj branĉetoj kaj lanugoj tuj ekbruliĝis. La birdidoj rostiĝis. Ankoraŭ iliaj flugiloj ne elkreskis kaj pro tio ili falis surteren. La vulpo kuregis tien kaj la birdetoj estis manĝitaj de ĝi.

La fabelo instruas, ke la insultantoj de la amikeco sukcesas eviti la venĝon de la insultitoj, sed de antaŭ la dia justicio oni ne povas rifuĝi.



## La kato kaj la koko



La kato kaptis la kokon kaj ĝi deziris manĝi, sed ĝi volis klarigi tion precize. Ĝi komencis akuzi la malfeliĉan kokon kaj ĝi diris, ke la kokerikado tre ĝenas la homojn, kiam ili dormas nokte. Kiam la koko protestante diris, tion ĝi faras tial, ĉar ĝi deziras bonon por la homoj, kaj matene ĝi nur vekas

ilin. Duafoje la kato tiel argumentis: „Sed vi estas ankaŭ senmorala”. La koko tiel defendis sin: „Tial mi faras tion, por ke la kokinoj demetu pli multe da ovoj por siaj mastroj.” La argumentoj de la kato elĉerpiĝis, fine ĝi diris: „Vane vi havas multe da kontraŭargumentoj, tio ne signifas, ke vi saviĝos kaj mi ne manĝos vin.”

La fabelo instruas, kiu estas preta fari pekon, tiun ne interesas la kontraŭargumentoj.

## La simio kaj la fiŝkaptistoj



Simio sidante sur alta arbo rigardis la fiŝkaptistojn, kiel ili fiŝkaptadas en rivero per reto. Ĉion ĝi bone atentis. Kiam la fiŝkaptistoj eltiris la reton kaj ili iris por matenmanĝi malproksimen, la simio malsuprengrimpis kaj ĝi ekprovis fiŝkapti, kiel la homoj. Ja ĝi estas imitema besto. Ĝi faris ĉion tiel, kiel ĝi vidis. Sed ĝi kroĉiĝis en la reton kaj estante en mallibero ĝi triste rimarkis: „Mi meritas, kio okazis al mi. Kial mi provis fiŝkapti, se mi ne lernis tion?”

La fabelo instruas, kial fari tion, kion ni ne scias. Krom la fiasko, eĉ ĝi estas danĝera.

(Tradukis: Apáti Kovács Béla)



## Szónyi István: Fiŝkaptistoj

# Hungaraj fortikaĵoj

# Hungaraj fortikaĵoj

